

VDON-K-2011-1 Rezulto

Nia sekretarioj raportas la sekvan rezulton de la reta voĉdono okazigita ekde la 17a de majo, kun voĉdona fazo inter la 6a kaj 20a de junio.

Entute voĉdonis 31 personoj el 19 landoj. Do, 57% de la validaj komitatanoj, kaj 65% de la validaj landoj.

1. Regularo pri Honoraj Membroj

La estraro proponas modifetojn en la regularo pri honoraj membroj por permesi honorigon de forpasintoj.

29 POR 1 KONTRAU 0 SINDETENO 1 NEVALIDA

(La kontraua voĉo fakte kontraŭis nur unu parton de la proponataj modifoj, ne la tuton)

2. Mandato de la Elekto-Komisiono

La estraro proponas, ke la tri-jara mandato de la elekto-komisiono venu al fino en la komitat-kunsidoj okazigitaj unu jaron pli frue ol la laŭplanaj estrarelektoj – praktike ke la komitato nomumu en Kopenhago elekto-komisionon por ofici de 2011 ĝis 2014.

31 POR 0 KONTRAU 0 SINDETENO.

Herzberg kaj Budapeŝto, 21 junio, 2011.